# *La aprobo de Trump iras surplanken*



Va?ingtono, jun 11 (RHK) La indikilo de aprobo de la usona prezidento Donald Trump, falis je 10 poentoj ekde majo pro lia malbona mastrumo de la kronviruso kaj la alta senlaboreco.

La populareco de la ?tatestro subiris de 49% en majo ?is 39% ?i-monate, dum la indikilo de malaprobo alti?is de 48% en majo ?is 57% la? la lasta enketo de la instituto Gallup, publikigita ?i-merkrede.

La plimulto de usonaj adoltoj partoprenintaj en la enketo, farita inter la 28-a de majo kaj la 4-a de junio, malaprobis la mastrumadon de la respublikana ?tatestro en la pandemio de la kronviruso, lia respondon al la protestoj enlandaj kontra? la polica perforto kaj lian malbonan mastrumon de la ekonomio dama?ita en tiu lando, raportis la televida ?eno HispanTV.

Trump anka? havas negativan indikilon de malaprobo en la ekonomio por la tria fojo en sia prezidanteco kaj la unua ekde 2017 kun 47% de aprobo kaj 51% de malaprobo.

La nova kronviruso metis Usonon en grandan krizon, ?efe en la labormerkato, kaj provokis ke la ekonomio falu en la plej grandan recesion dum jardeko.

La? raporto de la departemento de laboro, en aprilo la lando perdis pli ol 20,5 milionojn da laboro, tial ke la senlaboreco supreniris ?is 14,7%,  nivelo neniam okazinta ekde la Granda Depresio de la jaro 1929.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/225381-la-aprobo-de-trump-iras-surplanken

**Radio Habana Cuba**